Kuproserpento komencis vendadi siajn meblojn, orajn kaj arĝentajn cigaredujojn, diamantajn ĉemizbutonojn kaj kravatpinglojn. Li devis ŝanĝi sian elegantan loĝejon al modesta hotela ĉambro. Kiam jam eĉ por ĝi li ne havis monon, li luis du ĉambrojn en la periferio, inter *grundoj* kaj muelejoj. La loĝejo apartenis al juna kuracisto, kiu ne povis uzi ĝin, ĉar li estis militkaptito ie en Siberio. Lia juna edzino reiris hejmen al la gepatroj, por ke ŝi povu ludoni la ĉambrojn kaj tiel akiri iom da mono. Tiel ricevis Kuproserpento la du ĉambrojn. Sur la pordo de la loĝejo ankoraŭ brilis la orlitera tabulo: «D-ro. Zoltano Dévai. Akcepthoroj p.t.m. de la 3-a ĝis la 5-a.» Kaj en la ĉambro troviĝis la libroj de la sinjoro kuracisto, seriozaj, sciencaj verkoj, kiuj tre naŭzis Kuproserponton. Cetere, li estis tre kontenta pri la loĝejo. Li estis en trankvila domo, sur la unua etaĝo. La domo estis konstruita inter du *grundoj* kaj estis dudek minutojn distanca de la tramstacio. Kuproserpento neniam vidis la ĉirkaŭaĵon en taglumo, li ja kartludis dumnokte, hejmenvenis ĉe la mateniĝo kaj dormis ĝisvespere.

Ĝis al la muro por plu dormi. Hodiaŭ li ne volas ellitiĝi, kial ja? En la klubo ne estos ludo, do la vivo hodiaŭ ne havas celon. Jam matene li komencis la drinkadon, ĉiam li trinkis, kiam li vekigis. Tiamaniere li iel eltenos ĝis mateno, kiam li denove vendos ion kaj denove provos sian fortunon. Li fermis la okulojn. Tiam li aŭdis sonoron. Komence li opiniis, ke revenas la bona Giza... sed li ekmemoris, ke ŝi havas ŝlosilon por la loĝejo. Kiu sonoras? Kiu ajn, tutegale, li ne ellitiĝos. Sed la sonoro ripetigis, perforte, senpacience, oni eĉ ekfrapadis la pordon. Kuproserpento kolere saltis el la lito, sed eble kun sekreta espero: povas esti, ke oni portas monon al li... dio scias, eble iu rememoris pri li?

Li malfermis la pordon. Antaŭ la pordo staris soldato kun hirta hararo. — Kiun vi serĉas? — Kuproserpento demandis kolere. La soldato salutis. — Sinjoron doktoron. Kuproserpento alkriis lin: — Ĉi tie loĝas nenia doktoro. Li volis ĵetfermi la pordon, sed la soldato kontraŭstaris: — Sinjoro doktoro, pro dio... mia filineto...

Li ŝirmalfermis la pordon kaj jam estis interne de la antaŭĉambro. Kuproserpento kolere ripetis:

— Mi diras, ĉi tie loĝas nenia doktoro. La brusto de la soldato spiregis, kuregante li faris la vojon, li venis de malproksime. Li parolis balbute:

— Mi vidis la tabulon sur la pordo... en la tuta ĉirkaŭaĵo ne troviĝas alia kuracisto... mia filineto... nun mi venis hejmen por libertempo... do, se la sinjoroj doktoroj tiel... tiel forsendas malriĉulon... malriĉan soldaton, kies ununura filineto... sinjoro doktoro, se vi konas dion...

Li genuiĝis antaŭ Kuproserpento. Kuproserpento fariĝis ĉiam pli kaj pli kolera, ankaŭ la alkoholo efikis en li.

— Ĉu vi ne komprenas? Mi ne estas kuracisto... kiomfoje mi ripetu tion? Mi nur loĝas ĉi tie. Se vi ne kredas min, demandu la domzorganton...

La soldato ridis. Per bona, amara rido. Ankoraŭ ĉiam li genuis antaŭ Kuproserpento.

— Guste la domzorganto diros la veron... mi scias, vi instruis al li kion li diru... mi scias... la sinjoroj kuracistoj dum la vespero de Kristnasko ne volonte iras al malriĉa malsanulo... sinjoro doktoro, se vi konas dion... tiu kompatinda infano, kio estos, se ŝi mortos?

Li suprenrigardis al Kuproserpento, kun senespera petego. Lia buŝo konvulsiis, li krucigis la manojn. Kuproserpento kaptis la kolumon de la soldato kaj skuis lin.

— Starigu. Ĉu vi ne komprenas? Mi ne estas kuracisto, mi ne povas helpi vian filinon. Iru al kuracisto! Mi ne estas kuracisto.

Eĉ dekofoje li ripetis tion. Li kriegis, kvazaŭ li parolus al surdulo. La soldato ekstaris, li rigardis Kuproserponton kun okuloj kuntrilitaj.

— Doktoro Zoltano Dévai — li diris malrapide. — Doktoro Zoltano Dévai, akcepthoroj de la 3-a ĝis la 5-a. Tio estas skribita sur la tabulo. Doktoro Zoltano

Dévai, bonvolu veni kun mi, tio estas via devo... Ne timu, mi pagos vin.

Li frapis sian poŝon. Kuproserpento manfrapis enue kaj volis malfermi la pordon. Sed la soldato baris lian vojon. Subite ŝanĝiĝis lia vizaĝo, kun malluma minaco li rigardis Kuproserponton, jam ankaŭ li krlis:

— Vi venos kun mi, fripono, aŭ mi mortpafos vin.

Li elpoŝigis revolveron kaj celis al Kuproserpento. Kuproserpento ne estis malkuraĝa, sed tamen li ektimis. Milito, soldato, nun li venis de la fronto... kion signifas por li unu pafado, unu vivo, la vivo de alia, lia propra vivo? Lia filineto estas malsana, estas kristnaska vespero kaj li ne trovas kuraciston. Kaj li havas revolveron en la mano. La soldato estis kvazaŭ eltrovinta lian penson.

— Mi mortpafos vin... poste mi mortigos min mem. Mortaĉu la tuta mondo, se pereos mia filineto.

Li estis maljuna soldato, kun hirta hararo. Kaj liaj okuloj estis larmoplenaj. Kuproserpento levadis siajn ŝultrojn. Kion li faru kun tiu ĉi frenezulo? Per vortoj li ja ne povas konvinki lin.

— Bone. Mi iros. Atendu iomete, dum mi vestas min.

La soldato sidigis en la antaŭĉambro kaj atendis.

Kuproserpento trinkis la restintan konjakon kaj malrapide vestis sin. Kaj li ridis, kaj li kolere, li estis ebria kaj de minuto al minuto li fariĝis pli kaj pli ebria. Kiam kun ĉapelo surkape, en vintra jako li eniris la antaŭĉambro, li jam ŝanceliĝis iomete. Li ĉirkaŭbrakis la soldaton kaj prenis lian brakon.

— Mi estas doktoro Zoltano Dévai, — li diris ridante. — Mi iras al la malsanulo. Tio estas mia devo.

Kaj ili ekiris al la malsana knabineto. Unu frenezulo kaj unu ebrulo.

Dum longa tempo ili iradis en neĝo, koto, mallumo. Kuproserpento eĉ ne konjektis kie ili iris. En la malvarmo li iomete sobriĝis kaj kiam li enpaŝis la malriĉan ĉambro kun la soldato li iomete reordigis siajn pensojn. Malgaja, malgrasa virino sidis apud la lito kaj en la lito kuŝis malgrasa infaneto. Ok-aŭ dekjara knabineto. Ŝi spiregis lace, ŝiaj vangetoj estis varmegaj. La malgaja virino ekstaris kaj Kuproserpento okupis ŝian lokon apud la lito.

— Kiun malsanon havas la knabineto? — li demandis.

Neniŭ respondis. De li oni volis ekscii, kiun malsanon havas la knabineto.

Li metis sian manon sur la frunton de la knabineto:

— Febro, tion mi vidas. Febro...

La soldato kapbalancis, ankaŭ lia edzino. Febro! Ja, la doktoro scias ĉion.

— Ĉu ŝi estas malsana delonge?

La virino respondis. De kvar tagoj... ili ne venigis kuraciston, ili kredis, ke ĝi pasos ankaŭ sen kuracisto. Ankaŭ la edzo ne estis hejme, li revenis nur hodiaŭ, ankaŭ monon ili ne havis... sed hodiaŭ la knabineto svenis kaj pro tio ili tre ektimis...

Kuproserpento prenis la manon de la knabineto kaj rigardis antaŭ sin. Febro. Kaj finita lia scio. Kion li diru, kion li faru? Ĉu li rigardu ŝian gorĝon? Kion li vidos en ĝi? La infano... oni devas helpi ŝin... oni devas voki al ŝi kuracis-

ton, veran kuraciston, doktoron Zoltanon Dévai, la veran, kiu estas militkaptito en Siberio. Nun ankaŭ tie estas malvarme kaj en la militkaptitejo malvarmas la soldatoj...

— Ĉu vi bonvolus skribi recepton? — demandis la soldato per voĉo maltrankvila.

Kuproserpento vekigis. Verŝajne, dum longa tempo li sidis senvorte, enpense kaj en lia mano de kartludanto tenis la sensangan manon de la knabineto.

— Ne, ne — li diris rapide. — Mi kredas, ke ŝi havas nenion eksterordinaran... sed tio ne estas mia fako... tamen por trankviliĝi vin estus saĝe alvoki specialiston, iun infankuraciston!...

La soldato denove ridis per bona, amara rido.

— Kiun? Kiun en ĉi tiu damnita urbo, dum kristnaska vespero? Bonvolu skribi recepton, sinjoro doktoro...

— Sed...

— Recepton! — ripetis la soldato rauke. — Recepton, sinjoro doktoro aŭ...

Kaj denove li elpoŝigis la revolveron.

Kuproserpento kapitulaciis. Li sidigis kaj skribis la recepton. Li skribis sencajn latinajn vortojn, nelegeblajn malsagaĵajn ciferojn. Kaj li transdonis ĝin al la soldato por pretigi la medikamenton. La soldato treege dankis lin kaj transdonis al li dudek kronojn. Kuproserpento ne volis akcepti la monon, sed la soldato perfortis. Li ja havas sufiĉe multe da mono kaj la sinjoro doktoro bonvole venis ĉi tien... Kuproserpento pensadis dum iom da tempo kaj kun la espero de malbonŝanca kartludanto li enpoŝigis la monon. Eble ĝi alportos fortunon. Tiam li redonos al la soldato kun rento. La malgaja, malgrasa virino kuŝis lian manon. La infano kuŝis kun fermataj okuloj kaj ne movis sin. La soldato forkuris al la apoteko.

Kuproserpento iris hejmen. Li estis kontenta pri si, la recepton li trovis bona penso. La apotekisto rimarkos kaj diros al la soldato, ke tiu ne estas kuracisto, kiu skribis la recepton. Kaj tiam la soldato venigos alian kuraciston al la knabineto. Veran kuraciston, kiu skribos veran recepton kaj resanigos ŝin. Li enlitiĝis kaj ekdormis.

La alian tagon jam en la frua posttagmezo li estis en la klubo. Oni povis rimarki sur li ian ŝanĝon, kvazaŭ li estus freŝe gladita. Longe li vagadis ĉirkaŭ la kartotabloj, estis videble, ke li tre ŝatus ludi. Sed jam ĉiun tediis Kuproserpento. Finfine li atakis min:

— Venu, ni ludu!

— Mi ne ludas...

— Mi tre petas vin... faru al mi tiun amikan komplezon...

— Kial vi tiom insistas?

— Mi ne scias, eble mi volas elprovi mian fortunon...

Li tiel petegis, li estis tiel humila, ke mi kompatis lin. Ni ludis kaj mi perdis. Kuproserpento gajnis ducent kronojn.

Unuafoje en la lastaj du jaroj li gajnis. Momenton li sidis senvorte, poste subite li diris:

— Ne domaĝu tiujn ducent kronojn. Mi rakontas ion por ili...

Tiam li rakontis ĉi tiun historion. Ankaŭ ĝian finon.

Antaŭtagmeze je la deka horo sonoris ĉe li la soldato. Kun brilanta vizaĝo kaj danko. La knabineto resaniĝis. Ŝi glutis la medikamenton...

— Kiun medikamenton? — demandis Kuproserpento.

— Kiun vi bonvolis preskribi, — diris la soldato.

— Ĉu oni faris ĝin?

La soldato ekmiris:

— Kial oni ne estus ĝin farinta? Ĝin ja skribis sinjoro doktoro...

— Vidu, — diris al mi Kuproserpento — mi konas vin delonge, mi scias, ke vi estas clinika, malica homo, vi estas atelito kaj vi ne kredas, ke tio okazis, ke mi kun ebria kapo skribis iun nelegeblan malsagaĵon, la apotekisto faris ĝin kaj la knabineto resaniĝis. Sed mi diras al vi, mi Kuproserpento, ke estas iu, kiu zorgas pri la infanoj, pri la malsagaĵoj... kaj pri la ebruloj...

Li kolektis la gajnon kaj ridetante finis la frazon:





— ...kaj eble iom ankaŭ pri la kartludantoj.

Ankaŭ la 24-an de decembro 1917 je la kvina posttagmeze li lace kuŝis en la lito. Li jam estis maldorma, sed ne malfermis la okulojn. En la najbara ĉambro la bona maljuna Giza movetadis, la amantino de Kuproserpento, la sola iu, al kiu li ankoraŭ apartenis iomete! La bona maljuna Giza iam estis bonhumora kaj beleta; nun ŝi estis malgaja pro la ĉagreno de frua maljunigo. Kuproserpento tre bone sciis, kion faras ekstere la bona maljuna Giza: ŝi ornamas abieton per kandeletoj, sukeretoj, rubandetoj kaj per aliaj malsagaĵetoj. Kaj ĉe la malsupro de la arbeto ŝi metos kiel signon de ilia dudekjara interrilato la dudekan paron da pantofloj aŭ cigarediĝon. Kuproserpento ne volis partopreni en la aranĝo, la bona Giza foriru piedpinte, kiel ŝi alvenis. Li ja dankos ŝin morgaŭ... Ne nun, ĉar ja ankaŭ li estus devinta... ankaŭ li estus devinta. Li ja volis... bluzon, tri parojn da ŝtrumpoj, li eĉ kalkulis kiom ili kostas. Li volis gajni tiun monon, sed li denove perdis eĉ la lastan fileron. Li ja ne tre ĉagreniĝis, ankaŭ pasintjare tiel okazis... la bona Giza iom post iom kutimiĝos al tio.

La bona Giza foriris kaj Kuproserpento fine malfermis la okulojn. En la ĉambro estis mallumo, sed Kuproserpento eĉ en la mallumo trovis la konjakon. Li longe suĉis el la botelo, eble jam la okan aŭ dekan fojon. Poste li turni-

\*\*\*\*\*  
\* Kentekens :  
\*\*\*\*\*

Nr. 1 speld .....	fr. 8.00
Nr. 2 knoop of broche .....	fr. 10.00
Nr. 3 knoop of broche .....	fr. 12.00
Nr. 4 gekruiste vlagjes .....	fr. 15.00

1                      2                      3                      4

Werkelijke grootte.

VLAAMS ESPERANTO-INSTITUUT, P. van Humbeekstr. 3, Brussel-West.  
Postrekening : 3268.51

\*\*\*\*\*

**Karaj legantoj!** — Ankaŭ ĉi-jare ni daŭrigos niajn konkursojn celante: distri lernigante. Niaj solvintoj jam sufiĉe scias, kio estas postulata de la serĉanto: iom da atento, iom da pacienco kaj la helpo de bona vortaro. Do, ne pli ol tio kion ĉiu lernema esperantisto povas plenumi. Ili jam spertis, ke per agrabla verbostreĉado ili povas plivastigi sian vortprovizon, aŭ refreŝigi konojn ekdronantajn en neprecizecon. Iia ekzemplo instigu novajn serĉemulojn partopreni la konkurson, ne preterlasi tiun okazon konservi aŭ perfektigi sian Esperanton, kaj de tempo al tempo gajni belan libropremion.

La **REGULARO** de la konkurso, rezervita al la membroj de F.L.E. kaj al la abonantoj, restas sensanga: 1. Ĉiu korekta solvo valoras unu poenton. 2. Ĉiumonate havinda libro estas aljuĝata al la solvinto kun la plej alta poentonombraro; decidita la loto, se pluraj kunigas la saman nombron da poentoj. La nomo de la gajninto kaj la titolo de la aljuĝata libro estos publikigataj. 3. La poentonombraro de la premilo estas reduktata al 0; same tiu de partoprenanto, esendinta nenium solvon (bonan aŭ eraran) en la spaco de 12 monatoj sinsekvaj. 4. La ceteraj laŭokaze konservas aŭ plibonigas sian pozicion.

Generala **ATENTIGO ĈE LA SOLVADO**. 1. La difinoj kun (R) celas vorton uzotan sen la gramatikaj finaĵoj A.E.I. O. Tio ne signifas, ke ĝi nepre estu pura radikoj, ĝi ankaŭ povas esti kunmetita aŭ derivita. 2. En krucvortenigmo u kaj ŝ estu konsiderataj samvaloraj en krucigantaj vortoj. 3. Ĉiu uzata radikoj trovigas en la **VORTARO** de VAN

## Niaj Esperanto-Enigmoj kun premioj

**STRAATEN** aŭ en **PLENA VORTARO DE ESPERANTO (SAT)**. 4. Pri nomoj rilatantaj al la Movado aŭ al la Esperanto-Literaturo informas: **ISBRUCKER**: Historio kaj organizo de la Esperanto-movado, **DE BRUIN**: Gvidilo tra la Esperanto-movado.

**PREMIO**: Post la 18-a enigmo, F-ino R. A. Roose el Bruĝo gajnis la premion: «Du Majstro-Noveloj» de T. Storm. Ni gratulas!

**SOLVO DE LA 19-a ENIGMO:**

**HORIZONTALE**: 1. tapiŝ; strik. — 3. menci; rubus. — 5. estr; mok; po. — 6. piz. — 7. al; mul; hero. — 9. efluv; krani. — 11. teror; metio.

**VERTIKALE**: 1. temperament; — 3. penetr; kler. — 5. ŝlim; pulvor. — 6. mil. 7. serioz; skem. — 9. ribo; pedant. — 11. kosmopolito.

### N-ro 20: KRUCVORTENIGMO

**HORIZONTALE**: 1. Bestoj mangas ei ĝi (R); — Delokigi per premo (R); Interjekcio. — 2. Granda ŝtono (R); Stato de nedaŭra spirita malordo kaŭzata

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11
1											
2											
3											
4											
5											
6											
7											
8											
9											
10											
11											

de febro kaj karakterizata per malkonsekvencaj paroloj (R). — 3. Postulo (R); Kaŭzi al iu suferon pro ties malbonfaro (R); Arbo (R). 4. Skribe publike diskuti (R); Meti iun en akvon (R). — 5. Pritempa indiko (R); Insekto (R); Prepozicio. — 6. Oni uzas ĝin por fari tegmenton (R); Li arte verkas. — 7. Sufikso (R); Ne malhelpi (R); Greneroj senŝelaj maldelikate pistita (R). — 8. Familiano (R); Iomete diferenca leciono de iu teksto (R). — 9. Longa stango el metalo (R); Speco de fenestreto (R); Prefikso. — 10. Seninteresa (R); Nenormala malgrandegulo (R). — 11. Fumantoj ofte bezonas ĝin (R); Havi moralan devon esti dankaj al iu pro ia servo (R).

**VERTIKALE**: 1. Mangebla intesto de bestoj (R); En montrita loko; Prepozicio. — 2. Ornama arbedo (R). — 3. Nombro; Vastajo da akvo (R); Besto

(R). — 4. Sin amuzi per sencelaj viglaj ludaj movoj (R); Malfacile paŝanta pro kriplesco de piedo (R). — 5. Prepozicio; purigi (R); Malkonsenta (R). — 6. Pentristo bezonas ĝin (R); Mangajo konsistanta el diversaj herboj aŭ legomoj spicigata (R). — 7. Sufikso (R); Ĝi estas uzata por altiri la sangon al difinita parto de la korpo (R); Antaŭenpusi objekton, turnante ĝin (R). — 8. Ĝi ne bezonas radojn por veturi (R); Parto de la filozofio (R). — 9. Bongusta acideta bero (R); Difinita epoko (R); Interjekcio. — 10. Birdo (R). — 11. Peco de la teksto inter du malplenaj interspacoj; Portebla loĝejo (R).

Sendu la solvon sur aparta folio antaŭ la 20-a de februaro al V.E.B. Postbus 342, Brussel.

## Nia Kasisto vokas:



Betaalde U reeds uw lidgeld aan de V. E. B. voor 1947? Neen? Doe het dan onmiddellijk!

LI NE VOKU EN DEZERTO!

### ĈAPITRO 19-a

Kant kaj Gulopez staris por la tioma fojo en la koridoro kaj diskutis la farojn.

«Ni plej bone», proponis la inspektoro, «komence vizitu refoje nian kaptiton. Mi devas demandi ion al li. Se bezone, mi konfrontante volus...» Li ne finis la frazon. La sonorilo signalis la tagmangon. «Mangi», li ĝojis kaj ĝi sonis kiel batakrio, «mi ne sciis kio turmentis min, mi havis tiel strangan senton... venu, mangi ankaŭ gravas, eble eĉ plej gravas en la vivo.»

En la manĝejo ili trovis nur Yvonne Duret. Neniu alia aperis; eĉ Stella Sterlen ne montris sin.

Ili trope eksidis kaj provis babili pri generalaĵoj. Sed nevole la konversacio revenis al la okazoj de la lastaj dudek kvar horoj.

«Vi arestis Alex Steinmann, Sinjoro Kant?»

La spuristo neniam imagis ke lia nomo povas tiel bele soni. Felĉe, la viro kiu aŭdis tian gentilan voĉon diri lian antaŭnomon! Ĉu ŝi estus jam nomita Gulopez «Juan»?

Laŭte kaj iel abrupte li respondis: «Jesja, Fraŭlino, sed tio ne finas la kazon.» Li diligente kuleradis plu. Sur la tero feliĉe estas ankoraŭ bongusta mango. Plej provita kuracilo por trapasi multajn ĉagrenojn. Imagu ke Yvonne dirus «Xaverius» al li! Kiel ridinde tio sonus! Li havis la konvinkon ke li mem nehaltigeble ekridegus! Sed, kial la gepatroj ja donas tiel damne idiotajn nomojn al infano?

Observu Gulopez, li pensis, kiu ade mangas sed konsumis eĉ ne sian unuan pladon... Lia propra telero malplenigis jam duafoje kaj li ree atendis. Li ja ne povas elĉerpi la tutan supujon! Malgraŭe li iom mallerte riskis duontelereon. Kaj feliĉe, Yvonne denove ekbabilis. Tiamaniere li povis aŭskulti kaj havi pli bonan tenigon.

«La ŝipeinero rakontis al mi ke Alex Steinmann estas la aŭtoro. Mi esperis... mi opiniis, ke sekve la kazo estis solvita. Ĉu la enketo do ne antaŭeniras?»

«Jesja, la enketo progresas, Fraŭlino Duret. Malrapide sed certe — sekura antaŭ ĉio, diras profesoro De Groot. Kiel mi diris, la enketo progresas. Kant volis babili plu, sed lia nekutima elokvento surprizis lin. Jen alvenis la viandoplado. Li povis reaplombigi. Dum la tranĉado de viando ĉiaj vortoj superfluas. Stulte, ke li tute hazarde kaptis la plej grandan pecon el la plado.

«Ĉu Yvonne ne rigardis ĝuste lin? Antaŭen, kurage traranci!»

«Do, Sinjoro Kant, se mi bone komprenas, vi havas ja seriozajn motivojn por supozi ke la aŭtoro ne eskapas?»

«Ne timu, Fraŭlino, mi aranĝos la aferon.» Kant blufis. Li sciis tion. Sed ĉu eblis diri ke de la komenco oni fakte stagnas?

«Mi esperis tion, Inspektoro. Ŝia voĉo enhavis kuragiĝon sed samtempe petegon. Kiel do kelkaj vortoj de tiu ĉi knabino tiel katenis lin? Li aŭdis bategi sian propran koron.

Doktoro Gulopez demetis sian forketon.

«Ĉu vi vere kredas ke vi gajnos la venkon, Inspektoro?»

Tio estis afable dirita. Sed, ĉu ne lumis moko en la brunaj okuloj? Ĉu ne iomete da malico en la pala rideto? Incitite, Kant diris ion kion li neniam, en

## JAĤTO VETURAS EL...

«KRIMINALA ROMANO»

Tradukis: Dro T. Ken. Verkis: Deck Dorval.

RESUMO DE LA JAM APERINTAJ ĈAPITROJ

Dum plezurvojaĝo en la Mediteraneo, oni trovis la milionulon Maxton, posedanton de jaĥto, mortpafita en sia kajuto.

Inspektoro Kant, unu el la pasaĝeroj, helpata de la ŝakmajstro Gulopez, alia pasaĝero, provas solvi la dramatan enigmon. Ili venis al la konkludo, ke unu el la pasaĝeroj devas esti la kulpulo.

Suspektita junulo, Dubois, ankaŭ mortis en misteraj cirkonstancoj. La enketo kondukas al la familio Steinmann, la filo Alex jam estas arestita...

normalaj cirkonstancoj, estus dirinta:

«Antaŭ la alboriĝo en Marseille la kazo estos nepre klarigita.» Li sciis ke li eligas stultajn kaj konsciis kiel paro da mirokuloj direktiĝas al li. Kion fari por kaŝi sian konfuzon krom preni duan viandopecon? La mango bonfaris al li. La vino ne estis malbona. Se li nur sukcesus ree babili Yvonne! Lia laboro ŝajne interesis sin.

«Ĉu ia detalo, Fraŭlino Duret, kiu eble rilatas la aferon, ne envenas vian kapon?»

«Kion diri, Sinjoro Kant? Mi ne sciis multon pri sinjoro Maxton kaj liaj rilatoj kun la aliaj pasaĝeroj. Mi staris preskaŭ ekster tio. Mi timas ke mi ne informos vin pli.»

«Ni vidu, Fraŭlino Duret: ekzemple Notario Van der Meersch, ĉu borsaj operacioj estis ofte komisiitaj al li?»

«Jes, mi eĉ kredas ke li kutime plugis tiun kampon por la konto de sinjoro Maxton. Mia mastro estis tre ruza komercisto, kiu iam iris tre strangajn vojojn por atingi sian celon.»

«En sia apogea tempo, li estis ankaŭ sur la ŝaktabulo plej bona kombinanto, rimarkigis Doktoro Gulopez,» tre sagaca menso. Mi ne miras ke en la vivo li tiel sukcesis.»

«Do, la notario negocis grandajn sumojn?» Kant demandis. Doktoro Gulopez ĉi-foje neniel havu la okazon ekbruligi cerban fajraĵon pri ŝakteorloj!

«Mi kredas ke de tempo al tempo la notario estris grandan parton de la havaĵo de sinjoro Maxton, Yvonne medite diris.

«Kiel vi scias tion?»

«Mi foje, sendube antaŭ pli ol unu jaro, aŭdis lin telefoni al Majstro Van der Meersch ke, por la koncerna afero, li disponas senlimajn sumojn.»

«Pri kiu afero temis?»

«Mi ne povas diri. Mi ne plu memoras.»

«Sinjoro Maxton do nepre tute fidis Majstron Van der Meersch?»

«Mi supozas ke jes.»

Kant mendis kafon. «Vi supozas? Kaj via persona opinio pri la notario?»

«Mi... mi ne scias. Post la afero de la akcioj de...»

«La Iron and Steel Corporation», Kant kompletigis.

«Ha! ĝuste. Kiel vi scias tion?»

«En mia profesio oni finfine ekscias ĉion. Kant klare rimarkis sian admiron. De mirego ŝia nazeto vervele iom apertigis.

«Mi jam diris al vi ke en ĉi-afero sinjoro Maxton tre severe admonis la notaron kaj, de tiam, mi de tempo al tempo aŭdis lin malŝate juĝi lin.»

«Nu, neniel malgravas tio kion vi rakontas, Fraŭlino. Kion li i.a. diris pri Majstro Van der Meersch?»

«Jes, kion li diris?... Atendu. Ĝi signifas ke la notario ne cedis ĉiujn aĉeti-

tajn akciojn al mia mastro, sed versaĵne mem spekulis pri ili.»

«Dankon, Fraŭlino, eble gravas. Kaj kion vi opinias pri Higgs?»

«Pri Higgs? Nenion. Mi ĉiam rigardis lin tre fidinda servisto. Iam... strangeta.»

«Kion vi celas?»

«De tempo al tempo li ŝajnas tiel foresta kaj, kvankam tre sagaca, li iam metas demandojn stultajn kaj sensencajn.»

«Ĉu vi scias ĉu sinjoro Maxton tute fidis lin?»

«Mi ĉiam havis la impreson, mi eĉ kredas, ke li tre ligiĝis al li, kvankam li neniam esprimis tion.»

«Li estis tre malfacila al sia ĉambriŝto, ĉu ne?»

«Tre malfacila kaj, al Higgs, iam nepre provoka.»

«Ĉu vi scias ĉu Higgs havas familion?»

«Mi ne estas informita pri tio. Li estas viro kiun oni vole nevole imagas tutsola.»

«Jes», ridis Doktoro Gulopez, «same kiel oni ne imagus Profesoron De Groot sen ties edzino.»

Kant nur kaplinis kaj trinkis sian taseton malplena.

«Sur la ŝaktabulo la notario kaj Higgs, Gulopez plu diris,» ankoraŭ estas du figuretoj, kiuj permesas multajn eblojn. Ĉu vi ne konsentas, Inspektoro? Ni ne perdu tiujn ĉi figuretojn el vido, por ke ili ne mistifu nin.»

Fraŭlino Duret ŝajne atendis tion por ŝangi la direkton de la konversacio.

«Mi komprenoble ne tre lertas pri ŝakludo. Mi ŝategus iom progresi sur tiu ĉi tereno. Sed ja tion mi scias, Sinjoro Kant, ke oni devas singarde uzi la reĝinon.»

Kant akrigis la orelojn. Kie li jam aŭdis tion? Ridetante, Yvonne diris plu: «Mi kredas konsilinda ke ŝi neniam partoprenu la batalon, escepte kiam ŝi estas tiel ŝirmita ke eĉ danĝereto ne minacas ŝin. Ŝi estas tro grava figureto por senpripensa manovro.»

Gulopez aprobis kaptis. Li jam mirinde multe instruis al ŝi, Kant pensis. Ŝi konas sian lecionon parkere.

«Sed nun, Sinjoroj», Yvonne konkludis, «mia babilado jam sufiĉe tenis vin. Vi havas ja aliajn okupojn.»

«Efektive, Fraŭlino...», li preskaŭ diris «Yvonne». «Vi pravus. Sed ne forgesu: «La venko ridetas al la aŭdaculoj!»

«Ankaŭ prave, Sinjoro Kant», ŝi ridetante koncedis.

«Ĉio estas relativa, eĉ tio,» intervenis Doktoro Gulopez. Lia imago klopodis kompreni la sencon de la lastaj frazoj.

Yvonne adiaŭis. Kant tuj forlasis la pli altajn sferojn kaj alteriĝis ree meze de la kazo Maxton.

«Mi nun eldemandos nian kaptiton, Doktoro, ĉu vi kuniras?»

«Nu, se mi ne mankos al vi, mi volonte libertempos duonhoron. Mi ludos ŝakpartion en la salono.»

«Ŝakpartion? Kun kiu do?»

«Kun mi mem», ridetis la hispano lasante Kant subeniri sola kaj kapskuanta.

Kapitano Joost transdonis al li la ŝlosilon. Mallonge poste li frontis Alex en la malgranda kajuto. Tiu ĉi sidis sur la bordo de la benkolito kaj aspektis kiel mortkondamnito. Li kolere fiksrigardis Kant.

«Vi antaŭe deklaris ke hieraŭvespere vi ebriis?»

«Jes, kaj kion plu?»

«Ĉu pri tio vi ne plu memoras ion?»

«Ne, mi estis tro hirta.»

«Kiel vi do sciis ke Doktoro De Groot estis ĉe vi?»

«Ĉar li mem rakontis tion al mi ĉi-matene.»

Kant preskaŭ sakris. Nun, la tuta situacio ree ŝanĝiĝis.

«Kiam vi ĉi-matene vidis Profesoron De Groot? Je la kioma?»

«Mi ne plu scias. Mi ankoraŭ tro malsanis.»

Kant hezitis. Ĉu la Profesoro tamen... Li subite decidis, senplie forlasis Alex Steinmann kaj reiris al Kapitano Joost.

«Ĉu vi rimarkis ion suspektan ĉirkaŭ la tiea malgranda kajuto?»

«Ne, Inspektoro. Per la ĉielo, io nova ne...»

«Ne, ne, mi nur volis ekscii ĉu iu venis paroli al la kaptito.»

«Jes, sed mi malfruis por malhelpi ĝin.»

«Versajne sinjorino Steinmann?»

«Jes, kiel vi scias...?»

«Mi ja atendis tion. Ĉu vi aŭdis kion ŝi diris al sia filo?»

«Ne, mi komprenoble tuj boardis tien, sed la distanco estas ja kelkpaŝa. Kiam mi proksimiĝis mi ankoraŭ aŭdis ŝin mallaŭte flustris, sed ne sukcesis kompreni unu vorton. Rimarkante min, nu, tiam ŝi forpaŝis fiero, alte rekta, majesta, kvazaŭ ŝi estus la reĝino patrino mem, tiel!...»

Kaj Hans Joost komike provis imiti la reiron de sinjorino Steinmann.

Li ne jam tute kvietis kaj ree informis ĉu nepre nenio okazis.

«Ne, Kapitano. La afero nur ade pli komplikigis.»

«Ĉu postenigi mariston apud la... malliberejo, Inspektoro, por malhelpi similajn farsojn?»

«Ne, lasu ilin klaĉi, Kapitano. Temas ja pri tute eksterordinara kazo kaj ni klarigos ĝin per nekutimaj rimedoj.»

Scivolo pelis Kant al la salono. Li tie trovis Doktoron Gulopez klinita super ŝaktabulo kaj diligente notanta la diversajn puŝojn sur papero. Li mem eksidis en fotelon kaj envolvis sin en dika nubo da tabakofumo. Deko da minutoj pasis. La ŝakmajstro levigis.

«Venkis?» Kant sarkasme demandis.

«Ne, ne mi, sed Majstro Van der Meersch», ridis la alia kaj Kant neniel sukcesis kompreni la spritajon de la respondo.

(Daŭrigota)

Verantw. uitgever: Vlaamse Esperantisten-Bond, Postbus 342, Brussel. — Drukkerij: J. Van Laer, Oude Vaartstraat 194, Turnhout.